


Numero: 312.
Majo: 2018.

26-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefona: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Pri Vesperto

Antaŭ dudekses jaroj naskiĝis la ideo krei esperantolingvan monatan revuon.

Komence ĝi ekaperis presite sur papero kaj ĝi estis dissendita al la abonantoj.

Vesperto ĉiam estis senpaga. Mi petis la abonanton nur pagi la sendokoston, kiu tiutempe estis sufiĉe alta en Hungario.

Ne nur la redaktado estis malfacila laboro, sed ankaŭ la sendado per helikopŝto.

Poste la ekapero de interreto mi pensis, ke mi faros interretan revuon.

Mi decidis bone, ĉar tiel mia esperantolingva eldonaĵo povis atingi pli multe da geesperantistoj en la tuta mondo.

Kelkajn vortojn pri la enhavo. Vesperto estas literatura revuo. Sur la folioj mi donas eblon publikigi la verkaĵojn de komencantaj geesperantistoj. Krome ankaŭ amatoraj verkistoj kaj poetoj povas aperigi siajn verkaĵojn ĉi tie.

Por mi ĉi revuo estas tre grava, kaj espereble ankoraŭ longe mi povos aperigi ĝin.

Kompreneble estas necese ankaŭ via helpo. Ankaŭ en la estonto helpu, apogu min. Ĉefe legu Vesperton!

Se vi legas mian eldonaĵon, tiam bonvolu reagi! Diru, skribu vian sinceran kritikon pri ĝi. Informu min, se sur la paĝoj vi trovis lingvajn aŭ aliajn erarojn.

Mia plano estas krei interesan, enhavoriĉan, esperantolingvan revuon por riĉigi la esperantan literaturon.

Sen via helpo Vesperto ne povas prosperi.

Ankaŭ en la estonto sendu al mi viajn mallongajn verkaĵojn, poemojn, informojn! Ni redaktu kune ĝin.

Mi ne povas akcepti longajn verkaĵojn pro lokomanko. Espereble vi komprenas min, kaj verkos mallonge.

Vesperto restos senpaga kaj ankaŭ en la estonto ĝi estos legebla interrete.

Laŭ mi vole nevole la gazetoj, revuoj kaj aliaj eldonaĵoj ekaperos en la sekvaj jaroj, jardekoj tiel. De tempo al tempo malaperos la paperogazetoj.

La mondo progresas kaj ĝin oni ne povas haltigi.

Ĉu tio estas bona aŭ malbona, ne eblas scii.

Sed ni ne ploru pro tio! Ni uzu la modernan teknikon por disvastigi Esperanton!

— Redaktanto —



Sur la strato

Posttagmeze en sunriĉa vetero mi promenas sur la strato. Mi rigardas la montrofenestrojn. Preter mi homoj iras. Ili ne tro interesas min. Ili venas el la laborejo aŭ kelkaj rapidas al la proksima grandmagazeno.

Mi sidiĝas sur benkon, kiu staras sub ombra arbo. Mi sidas kaj enuas.

Neatendite knabeto ekstaras antaŭ mi kaj li alparolas:

— Onklo, bonvolu doni al mi monon!

— Kial vi bezonas monon? — mi demandas mire. — Eble vi aĉetos cigaredon. Ĉu ne?

La knabeto malgaje ĵetas rigardon al mi kaj li diras:

— Mi ne fumas. Mi neniam fumis.

— Ĉu? — mi ekĝojas. — Kion vi deziras aĉeti? Ĉu ĉokoladon?

— Ne. Ni estas malriĉuloj kaj antaŭ nelonge mi komencis lerni lingvon. Por mia lernado estas necesaj vortaroj.

— Ĉu vi lernas lingvon? Ĉu viaj gepatroj ne donas al vi monon?

— Ne. Mi jam diris al vi, ni estas malriĉuloj.

— Se vi estas malriĉulo, kial vi volas lerni fremdan lingvon?

— Por ke mi povu almozpeti ankaŭ de eksterlandanoj.

Min surprizis lia respondo. Li lernas fremdan lingvon por ke li povu almozpeti de eksterlandanoj.

— Iru al lernejo! Tie oni helpas vin. Eble en la lernejo oni donos al vi ankaŭ vortaron. Se vi lernos diligente, vi fariĝos saĝa homo kaj vi povos subteni vian familion. Ne tial lernu por ke vi povu almozpeti! Lernu por ke ne estu malriĉuloj en la mondo — mi diris al la knabeto, kaj fine tamen mi donis al li cent forintojn.

— Ŝaŝa —



Apáti Kovács Béla

Sonĝo

(– tria parto –)

La kastelo estis giganta kaj ĝi havis kvar turojn, kiuj estis altaj skrapante la ĉielon.

Andreo mirante rigardis ĝin kaj li ne povis ekparoli.

La monstro eksaltis sur liajn ŝultrojn kaj ĝi komencis laŭte ridegi.

– Vi estas mia sklavo kaj ekde minuto mi ordonas al vi.

Li sciis, ke li nur sonĝas kaj espereble baldaŭ li vekigós. Malgraŭ tio la sonĝo estis tre timiga por li.

Li volis liberiĝi de la monstro kaj de la terura sonĝo, kaj denove malfermi siajn okulojn.



Dormante li atendis la vekigon. Sed ĝi ne venis.

Li ŝvitis. Lia pijamo estus tute malseka. Kial oni ne povas vekigi el malbona sonĝo? Ĝenerale la belaj sonĝoj rapide forpasas kaj neniam revenas.

La monstro ordonis al Andreo eniri la kastelon.

– Enpaŝu la kastelon!

Andreo sciis, se nun li obeas, tiam li neniam povos vekigi. Por ĉiam li restos en la regno de la sonĝoj. Li devas kontraŭstari la ordonon de la monstro.

Li decidis forkuri, sed liaj piedoj ne povis ekmovi. Vane li deziris kuri, la piedoj ne obeis. Kvazaŭ ili radikigús en la teron.

Li komencis vead. Lia edzino timigante eksaltis kaj demandis:

– Kio okazis? Kial vi kriadas, karulo?

– Mi sonĝis malbonon – diris Andreo trankviliĝante. – Dank’ al vi, ke vi vekis min!

– Kion vi sonĝis? – demandis scivole la virino.

– Matene mi rakontos. Ni dormu! Ĝi estis tre malbona. Nun mi ne povas paroli pri ĝi.

– Bone, sed ne forgesu!

Andreo turnis sin al la muro kaj li fermis siajn okulojn.

Li ne povis ekdormi. Preskaŭ ĝis mateno li pensis pri la sonĝo.

Li ege timis, se li ekdormos, eble revenos la terura sonĝo kun la monstro.



Vane li trankviligis sin, ke tio ĉi estis nur sonĝo. Preskaŭ ĉiu sonĝas nokte, sed tiu ĉi sonĝo estis tiom malbona, ke Andreo jam mateniĝante kredis, efektive li vizitis tiun belegan, floran kampon kaj renkontis belan junulinon kaj montron.

Eble ĝi ne estis sonĝo kaj se nun li ekdormas, neniam povos liberiĝi.

Matene li iris por labori kun doloriga kapo kaj dormeme.

Tage li apenaŭ povis labori. Lin plu premis la sonĝo. Milfoje li devis pensi pri sia nokta aventuro.

Fine li jam sciis, la sonĝo estas realo kaj li hazarde transpaŝis alian dimension, kie lin tiu monstro sklavigis.

Vespere li timis enlitiĝi. La edzino ne komprenis kio okazis. Certe ŝi pensis, sia edzo freneziĝis.

– Ĝi estis nur sonĝo – ŝi provis konsoli lin, sed sensukcese.

Andreo timis la noktojn, se proksimiĝis la vespero lin ĉiam kaptis tremiĝo kaj maltrankvilo. El la domanoj neniu povis lin trankviligi.

(– Fino –)



Poezio

Ĉu vi legas versojn, poemojn ankaŭ en la someraj monatoj dum la feriado?

Legi ankaŭ en ĉi sezono estas agrable kaj utile. Mi legas poemojn preskaŭ ĉiutage. Ili dolĉigas mian vivon.

Ankaŭ vi legu ĉiutage kaj ne forgesiĝu pri Esperanto poezio. Ĝi estas kolora kaj riĉa. Ĝi estas granda trezorujo de la homaro. Helpe de la zamenhofa lingvo vi povas ekkoni la mondliteraturon.

Do, ne hezitu! Legu ĉiutage!

Petőfi Sándor (1823–1849)



Paŭlo Prokrasty

Kiel princo malbenita
trans la Ocean' Fabela,
sola vivas Paŭl' Prokrasty
grumble sur bien' nobela.
Ho, se estus edzineto,
ŝanĝus sin la vivmanier'...
Interrompis Paŭl' Prokrasty:
"Eh, ne urĝas la afer'!"

De l' kaduka dom' faladas
la mortero, kaj la vento

dio scias kie kuras
kun la peco de tegmento.
Riparigu, ĉar rigardos
tra l' plafono la ĉiel'...
Interrompis Paŭl' Prokrasty:
"Eh, ne urĝas la afer'!"

La ĝardeno dezertiĝis,
sed ja floras agrogrundo:
ĉia spec' de sovaĝfloroj
tie pompas en abundo.
Kial dormas laboristoj,
pigras la plugila fer'?
Interrompis Paŭl' Prokrasty:
"Eh, ne urĝas la afer'!"

Kaj la vestoj! L' olda jako
kaj trivita pantalono
taŭgus por araneaĵo
jam nur en necesbezono.
Sendu voki la tajloron,
drap' atendas en kamer'...
Interrompis Paŭl' Prokrasty:
"Eh, ne urĝas la afer'!"

Tiel li tra l' viv' vegetas.
Kvankam al li de l' praavo
restis heredaĵo riĉa,
ĉiam estis li sen havo.
Sed ne estas lia kulpo:
naskis lin hungara ter',
kie estas pradevizo:
"Eh, ne urĝas la afer'!"

Tradukis

Kalocsay Kálmán



Por infanoj



Abeleto kaj la kolombo

(fablo)



En iu tago la abeleto falis en la rivereton kaj ĝi preskaŭ dronis. Sur la bordo sidis kolombo kaj ĝi rapidis por savi ĝin. El arbofolio ĝi faris boaton kaj metante sur la akvon la kolombo sendis ĝin al la abeleto. Ĝi malfacile engrimpis la boaton kaj sukcese povis iri al la bordo. Sur la bordo ĝi sekigis siajn flugilojn kaj ĝi forflugis. Sed ĝi ne forgesiĝis pri sia savanto.

Pasis kelkaj tagoj kaj la abeleto rimarkis, ke ĉasisto celas iun beston. Ĝi timiĝante vidis, ke la homo celas ĝian savanton, la kolombon. Ĝi ne hezitis longe. Subite ĝi flugis al la mano de la ĉasisto kaj ĝi pikis lian fingron. Pro tio la ĉasisto faligis la pafilon. La abeleto estis eksterordinare feliĉa. Nun ĝi savis tiun beston, kiu antaŭe ne hezitis helpi ĝin.

Kion vi pensas, kio estas la instruo de tiu ĉi fablo? Pri kio ĝi instruas vin?

Ĉu okazis al vi, ke vi helpis iun kaj poste ankaŭ li helpis vin?

En tiu ĉi fabelo intermiksiĝas la realo kaj imagoj. Pripensu, kio estas la realo kaj kio povas esti nur en la fabelo!

- 1., La abeleto falas en la rivereton.
- 2., La kolombo faras boaton el arbofolio.

- 3., La abeleto pikas la fingron de la ĉasisto.
- 4., Ĉi tiu estas la plej malfacila: ĉu la abeleto povas forflugi, poste ke ĝi pikis iun?



Solvo

Kion vi pensas, kio estas la instruo de tiu ĉi fablo? Pri kio ĝi instruas vin? – Kiam ni bezonas helpojn, bone, se ni havas amikojn, kiu helpas nin, kaj kiam li/ŝi bezonas helpojn, ni helpas. En tiu ĉi fabelo intermiksiĝas la realo kaj imagoj. Pripensu, kio estas la realo kaj kio povas esti nur en la fabelo!

- 1., La abeleto falas en la rivereton. – Tio ĉi povas okazi.
- 2., La kolombo faras boaton el arbofolio. – Tio ĉi povas okazi nur en fabelo.
- 3., La abeleto pikas la fingron de la ĉasisto. – Tio ĉi povas okazi.
- 4., Ĉi tiu estas la plej malfacila: ĉu la abeleto povas forflugi, poste ke ĝi pikis iun? – Se la abeleto pikas iun, la pikilo restas en la korpo de la homo. La besto mortas. La vespo ne mortas post la piko.

(El fremda ideo

https://www.okosjatek.hu/rovid_esti_mese_gyerekeknek_az_okosjatek_tollabol tradukis: Apáti Kovács Béla)



